


Nr-o 74 **1988/1 Aprilo** **20a jaro**

Informilo de Esperanto Ligo Filatelista
– Faka asocio en UEA –





Cai Yuanpei (1868–1940) – Pioniro de Esperanto













Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidanto/Kasisto:	Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna
Stampobanko:	Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau Haveblas la oferto 1/88, pli ol 3000 sta k pm!
UEA-konto:	elfx/r
Poŝtkonto:	51 57 85-4, I. Paulsson, Solna, Svedujo
Kotizo por 1988:	15 respondkuponoj aú 15.– gmk, aú 15 novaj sta post interkonsento kun Heimlich.

Dankon al ĉiuj

geamikoj, kiuj sendis al mi informojn pri novaĵoj kaj malnovaĵoj! Pro la abundo da informoj pri la ĉinaj stampoj en la nuna numero ne povas aperi niaj rubrikoj: Aliaj pri ni – Glumarkoj – Famaj personoj – Niaj tutaĵoj – kvankam mi ricevis multajn informojn. Sekvontnumere! MI pardonpetas, ke pasintnumere dekduo da manuskriptaj paĝoj pri la ĉinaj stampoj ne aperis, sed hodiaú vi nun tenas bonegan materialon en viaj manoj! Dank'al la elstara kunlaboro de s-ro Ĉin Kajĝi. I.a. li kompilis la bildparton kaj la suplementon pri la ĉinaj stampoj. Tre bona estas la kunlaboro kun la Filatela Societo sub la Pekina Esperanto Asocio. Por ŝpari lokon mi eĉ kvaronigis tiun ĉi enkondukon. Necesas tamen esprimi dankon al tiuj, kiuj jam pagis la kotizon kaj tiel ebligis aperigi la hodiaúan informilon! Korajn salutojn al vi! Via redaktoro: R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Karl-Marx-Stadt, DDR-9047.

E-filatelistoj en ekspozicioj 1987

Anna-Greta Strönne	en la poŝta muzeo de Stokholmo (SVE)
Janusz Mikulski	en la poŝta muzeo de Vroclavo (PO)
	en nacia ekspozicio en Poznan (PO)
	en internacia ekspo en Essen (FRG)
Richard Hirsch	en nacia ekspozicio SÜDPOSTA (FRG)
	en du aliaj enlandaj ekspozicioj (FRG)
Stefano Fekete	en tri enlandaj ekspozicioj (HU)
Dolfa Bartoŝik	en enlanda ekspocio (CS)
Vladimir Vana	en int. ekspozicio en Kopenhago (DA)
Ĉin Kajĝi	en E-ekspozicio en Pekino
Koralo	en Mianyang, Chengdu kaj Siĉuan (CIN)
Rudolf Burmeister	en nacia ekspo en Karl-Marx-Stadt (GDR)
	en movada ekspozicio en la 72a UK (PO)

Koran dankon al niaj aktivuloj kaj gratulon pro la akiritaj medaloj.

Akvonazaj trompaĵoj

". . . la unua E-parolanta lando en la mondo. Kolektu niaj poŝtmarkojn . . ." jen teksto el anonco, kiu aperis ne nur en grandaj naciaj filatelaj gazetoj. Eĉ redaktoroj de grandaj movadaj gazetoj akceptis tiun okulfrapan mensogaĵon kaj publikigis ĝin. Temas pri glumarko kun la surskribo AKVONEZIO kaj KVIN. Po ok estas violaj, kaj flavaj. Ili surhavas iujn nebulozajn surpresaĵojn, kaj tiel naskiĝis la "16 poŝtmarkoj". La fonto de tiu diskriminacia afero verŝajne troviĝas en Svislando. Denove: temas pri glumarko!

Anoncoj

Ĉinio
Li Changlu, P.O. Damalu Changchun, Jilin, China 130042 deziras ricevi E-filatelaĵon el la tuta mondo kontraŭ ĉinaj.

Ĉinio
Peng Jianjun, Chezhan Xincun 440-1, Xujiapeng Wuchang, Wuhan, serĉas jubileajn E-filatelaĵon kontraŭ ĉinaj. Proponas ankaŭ ĉinajn alumet-etikedojn jubileajn.

Koreujo
So Gilsu, Seulo, Sodemun poŝtkesto 59 interŝanĝe serĉas E-fil.

Sovetunio
V. Bujak, Box 27, SU-220050 Minsk, leteraŭkcie ofertas aŭtografon de Zamenhof sur portreta pk el la jaro 1912. Ne estas konate, ĉu temas pri la samjare aperinta E-pk kun surpresita aŭtografo.

Kubo
Sinjoro Jesus R. Perurena Gonzalez, Apdo 66, Sagua La Grande, VC proponas ĉiujn kubajn sta kontraŭ alilandaj.

Meksiko
Angel Segura, Apartado M 2003, MEX 06000 Mexiko D.F. proponas la meksikajn sta kontraŭ alilandaj. Ne kolektas glm.

Pollando
J. Mikulski, Box 30, PL 10001 Olsztyn, proponas polajn sta kaj Klemensiewicz-pk.

Hungario
Vilmos Radnai, POB 40, H-2330 Dunaharaszti ofertas kontraŭ 5 irk + 1 irk afranko kompletan bildparton pri ĉiuj hungaraj E-filatelaĵoj (sen la bildpoŝtkartoj).

Kanado
Jubilean insignon el metalo eldonis la Kebekia E-Societo. 1 peco kostas 0.50 kanadaj dolaroj plus sendokostoj. Antaŭpago necesas. Esperanto Societo Kebekia, C.P. 126, Succursale Beaubien, Montral, (Quebec), H2G 3C8. (Kanado organizis la ĉijarajn vintroludojn!).

Elstara pioniro de Esperanto en Ĉinio

Cai Yuanpei (1868–1940) estis elstara moderna demokrata revoluciulo kaj edukisto. 1912 li estis ministro pri edukado en la Nankina Provizora Registaro sub Sun Jatsen. Li dekretis ke ĉiuj bazaj lernejoj tra la tuta lando malfermu stud-elektan kurson de Esperanto. 1917 li estis direktoro de la Pekina Universitato kaj malfermis studelektan E-kurson. 1922 li malfermis oficialan E-kurson en la universitato.

Jam ekde 1907 li estis esperantisto. Li apartenis al la unua vico de la E-pioniroj en Ĉinio. 1924 li partoprenis la 16-an Uk en Vieno. Nepre vi sciu, ke li estis proksima amiko de Lusin, de Sun Jatsen, de B. Shaw kaj ankaŭ de Eroŝenko. La ĉina poŝto eldonis 11an de januaro du memorigajn poŝtmarkojn okaze de la 120a datreveno de la naskiĝo de nia karmemora samideano Cai Yuanpei. Kelkajn notojn pri li vi trovas ankaŭ en la "Enciklopedio de E". Dankon al sinjoro Ĉin Kajĝi, kiu sendis al mi multe pli ampleksan artikolon pri li.

ĈIN 6
La ovalan jubilean stampon de Pekino eldonis la Ĉina Nacia Filatela Korporacio kaj ĝi montras nian jubilean simbolon kaj la E-stelon. La sama institucio eldonis unuatagan koverton kun kolombo super multkolora grafikaĵo. La stampon kaj la utk desegnis s-ino Xu Hongru.

ĈIN 7
En Pekino aperis dua jubilea stampo lige kun la E-pm. Eldonis ĝin kaj la utk-on la Pekina Poŝtmarka Kompanio. La stampo montras E-stelon apud "100", la utk multkoloran terglobon kun E-stelo. La stampon kaj la utk-on desegnis s-ino Ren Ju.

ĈIN 8
La jubilea stampo de Changchun montras terglobon kun buŝo en ĝi. La utk montras bluan terglobon kaj tri sagojn kun la jubilea simbolo. La utk kaj la stampo estas eldonitaj de la Filatela Kompanio. Desegnis ilin Ma Tianyu.

ĈIN 9
La poŝtoficejo de Changji pretigis jubilean stampon, meze en ĝi nigra E-stelo kun blanka E. La sama poŝtejo eldonis utk-on kun tri oraj sunoj kaj nia jubilea simbolo. Du aliaj stampoj, troveblaj sur la utk ne estas poŝtaj. La stampon kaj la utk-on desegnis Ma Kehua, Zhang Jingwen kaj Ba Jingke. Eldonkvanto de la utk: 3.000.

ĈIN 10
La jubilea stampo de la urbo Changsha montras tri vertikalajn elipsojn en cirklo. Mi posedas tiun stampon sur koverto de la loka E-klubo.

ĈIN 11
En Changshu la poŝtoficejo aperigis du jubileajn stampojn kaj unu utk-on. ĈIN 11 estas ronda kaj montras E-stelon kaj nian jubilean simbolon. La utk montras portreton pri Zamenhof, jubilean simbolon kaj E-stelon.

ĈIN 12
La dua jubilea stampo de Changshu estas triangula. Tiu montras du manojn, la jubilean simbolon kaj E-stelon. La stampojn kaj la utk desegnis s-ano Zhang Linrui, veterana esperantisto.

ĈIN 13-1 kaj -2
La PT Oficejo de Ĉangĝou uzis jubilean rektangulan stampon kaj ankaŭ tiu de la urbo Ĉjiŝujan. En la stampo estas nia jubilea simbolo kaj E-stelo. Ekzistas utk kun portreto de Zamenhof kaj faksimilo de la unua lernolibro por rusoj. La stampon kaj la utk desegnis Zhang Linrui, kies nomon ni trovos pli ofte lige kun la ĉinaj stampoj.

ĈIN 14
La ronda tergloboforma stampo posedas en la mezo nian E-stelon kaj ĝi venas el la urbo Ĉengdu en la provinco Jiangsu.

ĈIN 15
Tiu stampo el Chongqing konatiĝis al ni nur fine de decembro. Temas pri ronda stampo kun la vorto ESPERANTO en ĝia mezo. Ankaŭ ni vidas malgrandan jubilean simbolon. Spure videblas kontinentoj en la stampo. Ekzistas nepoŝta memoriga koverto lige kun ĝi.

ĈIN 16
La Filatela Kompanio de la urbo Fuzhoú eldonis tiun buŝoforman jubilean stampon kun lango en ĝi, kiu montras nian jubilean simbolon. Bela unuataga koverto akompanas tiun stampon kaj ĝi montras bluan terglobon.

ĈIN 17
Mi persone tre dubas pri la poŝteco de tiu ĉi stampo, kiu ja laŭ desegnaĵo tute estas identa kun hungara jubilea glumarko. Vidu ĝian bildon en nia bildparto. Tiun stampon oni anoncis (raportis) el la urbo Guangjuan.

ĈIN 18-1 ĝis 18-6
Tiun stampon la poŝto uzis en la urboj Guangzhoú, Jiangmen, Shantoú, Shenzen, Yangjiang kaj Xinhui en la provinco Guangdong. Kompreneble kun diversaj ideogramoj por la urbonomoj. Ekzistas bela utk kun Zamenhofa portreto. La Jiangmen-a E-Ligo aperigis belan memorkarton.

ĈIN 19
La ronda jubila stampo el Guilin prezentiĝas kiel terglobo kun ekvatoro. Supre en ĝi nia jubilea simbolo kaj sube teksto en la ĉina.

ĈIN 20
Por pli fluigi la legadon mi ekde nun skribas la nomojn laŭ la Esperanta Transskriba Sistemo. Do: tiu ĉi stampo el Gujjang montriĝas kiel oblikva terglobo kun horizontala ESPERANTO tra ĝia mezo.

ĈIN 21
La jubilea stampo el Hangĝou konatiĝis al ni nur en decembro 1987. Meze en ĝi malgranda terglobo kun maneskribita "Esperanto". Ekzistas unuataga koverto kun stilizitaj du manoj kaj terglobo.

ĈIN 22
Tiu ronda jubilea stampo venas el la urbo Harbin kaj montras al ni en ĝia mezo stilizitan terglobon. Mi havas ĝin sur poŝtkarto.

ĈIN 23
Hefej nomiĝas la urbo, el kiu venas tiu ĉi jubilea stampo kaj ĝi montras en interna cirklo nian E-stelon kun "E". En ĝia suba rondo ni legas: Centjara Jubileo de Esperanto. Utk-on eldonis la Poŝtmarka Kompanio de Hefej. Dorsflanke ĝi montras florojn, E-stelon kaj la ciferon 100.

ĈIN 24
Tute ĉine aspektas tiu ĉi stampo el Ĝjaŝing. Grandaj dikaj ideogramoj en la supro. Meze en rondo nia E-stelo kaj sube la dato.

ĈIN 25
Venas el la urbo Jinan. En rektangulo supre 100. En la ciferoj desegnaĵoj, i.a. terglobo kaj ŝipo (dekstre). Verŝajne en la stampokuseno mankis sufiĉe da inko.

ĈIN 26
La stampo el Ĝjiŝjan montras al ni Zamenhofan portreton kaj ideogramojn pri la centjara Esperanto. Ni eksciis pri ĝi nur post tiu fruktedona Ĉin Kajĝi-artikolo en LA MONDO, 11/87.

ĈIN 27
Rubando kun la surskribo ESPERANTO ĉirkaúas terglobon en la jubilea stampo el la urbo Kajfeng. Informoj pri koverto ne atingis nin.

ĈIN 28
Jen stampo el Kunming okaze de nia jubileo. Kunming estas la naskiĝurbo de nia E-filatelo, ja tie aperis la unua ĉina E-stampo. (Iniciatis ĝin siatempe sinjoro Ĉin Kajĝi, se mi bone memoras). En la mezo de la stampo nia jubilea simbolo kun sputnika orbito. La esperantlingva teksto en ĝi: MEMORAS 100 JARON DE ESPERANTA NASKIĜO. La Kunming-a Poŝtmarka Kompanio eldonis utk-on kun blua terglobo. Desegnis ĝin: Zhang Dahua.

ĈIN 29
Tiu ĉi stampo konatiĝis nur en januaro 88 al ni! La literoj SHI JIE YU en la stampo estas hanlingvaj fonetikoj de la ĉinaj ideogramoj kaj signifas "Esperanto" (n). En la stampo de Ljuĝou ni vidas sputnikan orbiton kaj terglobon.

ĈIN 30
Tiu ĉi jubilesimbolforma ovala stampo el la urbo Ma'anshan portas en ĝia suba parto la nomon ESPERANTO kaj supre la jarciferojn 1887–1987. Sube 5 ideogramoj por la nomoj de la provinco Anhui kaj de la urbo.

ĈIN 31
Nian jubilean simbolon montras stampo el Nanĉang. Mi persone iom dubas pri ĝia poŝteco pro ĝia aspekto. Sed ĝi ekzistas kaj ni devas listigi ĝin.

ĈIN 32-1 kaj -2
La ovala jubilea stampo montras nian jubilean simbolon. Desegnis ĝin Yang Zhongqin. La unuatagan koverton de la Nanjing-a Poŝtmarka Kompanio kun la blua ovala terglobo kaj oraj radioj desegnis Xu Fulin. La stampo estis uzita en Nanjing (32-1) kaj en Yangzhou (32-2). Dankon al nia Song Shengtan, kiu sendis ĝin. Nia amiko malsaniĝis kaj ni ĉiuj deziras al li baldaúan resaniĝon kaj pli helan estonton.

ĈIN 33-1 ĝis 33-3
Jen denove malfruaj, decembraj, trovaĵoj. En nia bildparto ili ja klare aperas, sed nur dank'al la pentroarto de nia Ĉin Kajĝi, kiu permane ilin kopiis pro la malbona inkokvalito. La stampo estas ronda, jubilesimbolforma kun vertikala tekstotrabo tra ĝia mezo. Daton en ĝi mi ne trovis. 33-1 venas el Nanning, 33-2 el Baise kaj 33-3 el la urbo Ningming.

ĈIN 34
Tiu ronda jubilea stampo venas el la urbo Nanning kaj ĝi montras grandan E sur terglobo. Supre en la stampo per ideogramoj teksto pri nia jubileo kaj sube la dato kun kvar ideogramoj por la urbonomo kaj la nomo de la provinco. La Nanning-a Filatela Kompanio aperigis unuatagan koverton kun ora terglobo. Eldonkvanto: 3500 pecoj.

ĈIN 35
Jen tre interesa stampo el Ningde, provinco Fujian. Eldonis ĝin la Ningde-a Poŝtmarka Kompanio kaj desegnis Fang Yude. La stampo montras terglobon kun malfermita E-libro. Supre ideogramoj pri nia jubileo kaj sube ideograma teksto pri Lin Zhenhan (alinome Wei Wen, 1883–1932) kiu kompilis la unuan ĉinan E-lernolibron. La sama Pm-Kompanio eldonis utk-on kiu montras terglobon kun faksimilo de la unua ĉina E-lernolibro. Desegnis ĝin Cai Gangcheng. Gratulon al niaj samideanoj en Ningde, kiuj sukcesis aperigi tre interesan movadhistorian filatelan dokumenton.

ĈIN 36
El la fama urbo Ĉingdaú venis tiu ĉi jubilea stampo. En tiu urbo ne nur viglas nia E-movado, sed ankaú tie oni produktas bonegan bieron. Tion asertis s-ano Li Shijun dum sia restado en GDR. La ronda stampo posedas en la mezo grandan E-stelon kun nia jubilea simbolo. Sube la teksto: CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO.

ĈIN 37
Jubilea stampo estis uzata ankaú en la grandurbo Ŝanhajo. En tiu urbo fondiĝis la unua Ĉina E-Asocio 1912 kun Cai Yuanpei kaj aliaj! En la mezo de la stampo estas kolombo kun laúrbranĉo.

ĈIN 38
En la provinco Liaoning situas la urbo Ŝenjang, kaj ankaú de tie venis E-stampo. Grandlitere pompas sur la ekvatoro de ovalforma terglobo la vorto ESPERANTO.

ĈIN 39
Ronda jubilea stampo el Suĝou montras E-stelon kun blanka E en ĝi. En la suba rondo en Esperanto: CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO. La poŝtmarka korporacio de Suĝou eldonis unuatagan koverton kun brunkolora portreto pri Zamenhof. Desegnis ĝin samideano Zhang Linrui.

ĈIN 40
Jen ronda jubilea stampo el la urbo Tajjuan kiu posedas trumpetan tubon en la mezo. En la trumpeta tubo la vorto ESPERANTO. Ili estas ideoriĉaj, niaj ĉinaj samideanoj. Bedaúrinde la stampo malbone estas legebla. En nia bildparto mi iom inke riparis ĝin.

ĈIN 41
La rektangula jubilea stampo el Tjanĝin montras termapon kun tri diversrasaj kapoj en ĝi. La Tianjin Poŝtmarka Kompanio aperigis ankaú belan utk-on kun kolombo, laúrbranĉo kaj tri diverskoloraj vizaĝoj. Desegnis: Li Enrong.

ĈIN 42
En Urumĉi funkciis tiu viola jubilea stampo, desegnitan de Shan Weili. Granda E-stelo pozas sur terglobo. Apud ĉinaj ideogramoj troviĝas ankaú ujgura skribo por la nomo de la urbo.

ĈIN 43
La jubilea stampo el Vuhan posedas eksterordinare grandan mezuron: 57x42. (Pli grandaj troviĝas tamen en Bialystok kaj en Olsztyn). En viola koloro ĝi montras nian jubilean simbolon kaj sube la vorton ESPERANTO.

ĈIN 44
Belaspekta estas la stampo el Vuŝji. Sur la ekvatoro de terglobo estas la vorto ESPERANTO kaj sub ĝi ni vidas buŝon. Bedaúrinde mankas informoj pri koverto kaj desegnisto.

ĈIN 45
Vuĝou nomiĝas la urbo, el kiu ĝi venas. Denove ni vidas nian jubilean simbolon en E-stelo sur terglobo. La stampo konatiĝis nur en decembro.

ĈIN 46
Jubilean simbolon ni ankaú trovas sur la stampo el la urbo Xiamen (Ŝjamen). La stampo aperas kiel stilizita terglobo kaj montras numeron 100 kaj malgrandan E-stelon.

ĈIN 47
Ankaú tiun stampon trovis Cin Kajĝi nur meze de decembro 1987 post la LA MONDO-artikolo. Kaj ankaú ĝi venis el Ŝjian. La stampo havas formon de kvinpetala floro kaj tre similas al metala E-insigno, kiun donacis al mi Li Shijun. En la mezo de la stampo nia E-stelo. Belan unuatagan koverton kun eldonkvanto de 5000 eldonis la Shaanxi-provinca Poŝtmarka Kompanio. Sur verda stelo ĝi montras multkolore nian jubilean simbolon. Tre bela!

ĈIN 48
El Ŝjian venis al ni ovala jubilea stampo en formo de terglobo kun E-stelo en ĝi. Sur la ekvatoro maldekstre ESPERANTO. Apud ĝi E-stelo. Belega unuataga koverto montras radiantan terglobon same kiel sur la jubilea pm. Desegnis: Zhao Junlong. La utk-on eldonis la Xi'an-a Poŝtmarka Kompanio.

ĈIN 49
Langorompanto denove la nomo de tiu ĉi urbo: Sjangŝan. La stampo havas formon de malfermita libro kun terglobo en ĝi. En decembro 1988 s-ro Kajĝi ĝin trovis kaj ankaú la sekvan!

ĈIN 50
Tute simpla, ronda kun nia E-stelo en la mezo estas tiu ĉi stampo el Xinxiang (Ŝin-ŝjang). Apud la stelo du ideogramoj por la urbonomo.

ĈIN 51
Jinĉuan nomiĝas la urbo, el kiu venis tiu jubilea stampo. Ni vidas sur ĝi manpremon antaú ovala terglobo kaj kvin homoj portas la vorton ESPERANTO.

ĈIN 52
El Ĝenĝjang venas tiu ĉi impona jubilea stampo. Sube la teksto: CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO. En la mezo terglobo kun granda E kaj 100. Iom ĝi similas al nia CIN 7.

ĈIN 53
El Ĉengĝou venis tiu ronda jubilea stampo kun ovala terglobo en ĝia mezo, sur ĝi nia jubilea simbolo. Unuatagan koverton eldonis la Zhengzhou-a Poŝtmarka Kompanio kaj desegnis ĝin Zhen Zongming. Sur la utk ni vidas 9 personojn, kiuj ĉirkaúas verdan E-stelon.

ĈIN 54
En Mianjang modele aktivas la E-filatelisto Chen San (KORALO). De 26.7–28.7.1987 tie okazis filatela E-ekspozicio, fare de KORALO. Okaze de la ekspozicio la poŝtejo uzis du stampojn. La unua, ronda, en ĝia mezo posedas terglobon, la jubilean simbolon kaj E-stelon. Supre en la ĉina kaj en Esperanto la tekston: Filatela Ekspozicio pri Esperanto de KORALO.

ĈIN 55
La dua stampo montras al ni kolombon kun E-stelo en la beko. Por ambaú stampoj la loka poŝtejo eldonis memorigan koverton kun la teksto: FILATELA EKSPOZICIO DE KORALO. Desegnis ĝin Li Sicong. La du stampojn desegnis s-ro Zhu Xiaoming. Dankon al KORALO pro la senditaj informoj kaj kolora foto.

ĈIN 56
Pere de Ĉin Kajĝi atingis min salutletero de Zhang Linrui el la urbo Ĉangŝu. Sur ĝi tiu ĉi poŝta stampo kun la esperantlingva teksto: LA 13-A TUTLANDA KONGRESO DE ĈKP. La stampo montras flagon kun martelo kaj falĉilo. Ekzistas nepoŝta utk kun la samtage aperinta pm pri tiu kongreso. La koverton eldonis kaj la stampon desegnis Zhang Linrui.

ĈIN 57
DRAKA JARO estas la esperantlingva teksto en tiu ĉi unuataga stampo por la eldono de la drakjara poŝtmarko. Ankaŭ ĝi atingis min trans Ĉin Kajĝi de Zhang Linrui. Dankon! La stampo ankaŭ montras drakon. Kompreneble. Laŭdire la drako estas la plej ŝatata simbolfiguro en Ĉinio. Legu pri tio en EPĈ! La oficialan unuatagan koverton de la Changsu-a PT-Oficejo desegnis Zhang Linrui (Ĉanŝio), kaj ankaŭ la stampon.

ĈIN 58
Kaj nun mi feliĉe kaj dank'al Dio atingis la plej freŝdate aperintan poŝtstampon el la urbo Ĉangŝu. Dankon al la redaktoro Zhang Linrui de VERDA LAMPIRO, tre ŝatata E-gazeto en Ĉinio-kiu atingis laste numeron 200! La stampon iniciatis Zhang Linrui pro apero de du memorigaj poŝtmarkoj pri Cai Yuanpei, E-pioniro. En la unuataga stampo la esperantlingva teksto: LA 120-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE CAI YUANPEI. Ekzistas memoriga koverto kaj oficiala unuataga koverto, la lasta eldonita de la Ĉina Nacia Filatela Korporacio.

Jubileaj alumet-etikedoj en Ĉinio
Neeblas aperigi ĉi-foje glumarkan angulon pro la stampo-inundo. Tamen mi devas sciigi pri la ĉinaj alumet-etikedoj lige kun nia jubileo. Ilin eldonis la Jinjiang Alumeta Fabriko. Sur la kvar etikedoj estas tekstoj en la ĉina kaj en Esperanto:
4-1: 1987 LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO
4-2: D-RO ZAMENHOF
4-3: E INSTRUATA KIEL LA DUA LINGVO . . .
4-4: 72a UK
Koran dankon al Peng Jianjun pro la informoj!

KU 1
Denove pri ĝi! KU 1-1 funkciis 15.12.86 kaj sube posedas la noton APERTURA (malfermo). Tiu sta troviĝas sur memorkartoj kun verda surpreso. KU 1-2 funkciis 16.12.86 kaj sube posedas la noton CLAUSURA. Troviĝas sur nigre surpresitaj memorkartoj.

KU 4
Jen dua stampo el la naskiĝurbo de la kuba E-filatelio, SAGUA LA GRANDE. La stampo posedas la tekston: KUBA KONGRESO DE ESPERANTO kaj SALUTON EL UNDOSO. Krome en ĝi estas mapo pri Kubo kaj E-stelo. Dato: 29.11.1987. Dankon al s-ro Gonzalez pro la informo, kiu estis multe pli ampleksa . . .

KU 5
S-ro Gonzalez sciigis ankaŭ pri tiu ĉi stampo el Havano 4 kun la teksto: UNUA KONGRESO DE KUBA ESPERANTO ASOCIO (KEA). La stampo funkciis la 4an de decembro post la malfermo de la kongreso. En ĝi aperas E-stelo kaj floro. KEA aperigis plaĉan memorigan koverton kun reliefa, senkolora, surpreso: ESPERANTO CENTJARA PONTO INTER POPOLOJ. Ni kore dankas al s-ro Gonzalez.

MEK 3
Jen informo pri dua jubilea E-stampo de Meksikio, kiun peris al ni nia kluba amiko Angel Segura, prezidanto de la Meksikia Esperanto Asocio. La stampo aperis lige kun solenaĵo okaze de la centjariĝo de E, organizita de la pola ambasadejo kaj MEA la 15an de decembro. Pri ĝia aspekto bv. konsulti ĝian bildon en nia LVL. Dankon al Segura.

HU 105
Jen nova memoriga stampo pri la VEF, 17a, el Budapest 8. La jam konata VEF-neĝviro ĉijare kun sia surventra E-stelo konsiderinde dikiĝis, kaj la literoj fariĝis pli elegantaj. La stampo funkciis la 28an kaj 29an de decembro. Dankon al niaj amikoj Fekete kaj Radnai. Tiu HU 105 estis la laste aperinta poŝta stampo dum nia jubilea jaro.

FRA 52
La ronda jubilea stampo el la urbo MONITGNY LES METZ montras al ni manpremon, E-stelon kaj la tekston: "amikeco trans limoj". En la supra rondo: 1887 – CENTENAIRE DE ESPERANTO – 1987. La poŝta giĉeto funkciis en la Kultura Centro marc Sangnier en la kadro de la 25a staĝo de Kultura Esperanto Federacio de Orienta Francio. La stampado okazis de la 16a – 18a h. la 7an de novembro 1987. Koran dankon al nia Mikaelo Basso!

BU 18
Nia amiko Hlebarov sciigis, ke li trovis tiun maŝinvarbstampon de SOFIA 1000, kiu en sia tekstoparto montras nian jubilean simbolon kaj la tekston 100 JAROJ ESPERANTO, STO GODINI ESPERANTO, 1887–1987. Supozeble temas pri senfina ms, ĉar ĝiaj tri partoj konsistas el: tp, ds kaj ondolinia parto. Li trovis du pecojn kun la datoj 25 kaj 30.6.87. La stampo estas rara, ĉar neniu sciis pri ĝi, escepte de la mendinto, kiu tion tamen prisilentis.

GDR 34
Jen la unua poŝta E-stampo en la dua jarcento de Esperanto. La stampo venas el la movade vigla urbo Leipzig kaj bele prezentas nian plej gravan taskon: instrui Esperanton. En la stampo pozas du lernantoj kiuj studas E-lernolibron. Tiu stampo devis funkcii jam 15an de decembro, okaze de la TAGO DE LA ESPERANTO LIBRO, sed la poŝto tion rifuzis pro la labormaksimumo okaze de jarfino. Nun ĝi funkciis de la 4a de januaro ĝis la 3a de februaro 1988, en la ĉefa poŝtejo de Leipzig. Dankon al nia amiko Beau, kiu informis pri ĝi kaj sendis bonegan fotokopion por nia LVL.

ITA 42
Fine de januaro 88 ĝi venis en miajn manojn, tiu itala stampo pri CONGRESS TRINAZIONALE ESPERANTO el la itala Udine kun la dato 5.9.1987. Temas ŝajne jam pri la 19a tia kongreso laú la stampoteksto. Niaj italaj klubaj geamikoj tute ne rimarkis ĝin, mi ricevis ĝin de s-ro Neussner, unu el la ankoraú aktivaj Idistoj. Dankon al li! Atentu! La stampo de Pisa fariĝis ITA 43!

JU 34
Nun mi almenaú vidis ĝin, sur paĝo de EPĈ, kiu tamen nur atentigas pri "speciala poŝtkarto", anstataú pri la, por ni, multe pli interesa poŝta Esperanto stampo. La karton aperigis la lokal filatela klubo kaj ĝi posedas la noton: FDZ 3/87 kaj ĝi montras la JAFE-insignon sur reloj, jubilean emblemon kaj la tekston ESPERANTO/100 JAROJ EN SERVO DE HOMARO:
La ronda stampo posedas la tekston: 100GODINA ESPERANTA/GODISNJA SKUPSTINA JAFE kaj en ĝia mezo troviĝas la JAFE-insigno, la nomo de VRNJAĈKA BANJA, la dato 18.04.1987. La stampo ŝajnas esti presita.

JU 35
En miajn manojn trafis sendaĵo, kiu enhavis tiun ĉi novan stampon, kiu tekstas: 80 JAROJ/DE ORGANIZITA/ESPERANTO/MOVADO EN/RIJEKA/30.10.1987/51101/ RIJEKA kaj enhavas E-stelon kun la jarciferoj 1907/1987. La stampoj estas surpresitaj en nigra, verda kaj ruĝa. Ekzistas memorigaj kovertoj de la loka filatela klubo en Rijeka, 66/87, kiuj portas la saman tekston kiel la stampo.

JU 36
Sinjorino Almaŝi sendis informon pri tiu ĉi nova stampo. Apud nacilingva teksto ĝi surhavas la esperantan: TRILANDA RENKONTIĜO ESPERANTISTA. Uzita ĝi estis en 24400 SENTA 06.11.1987. En ĝia mezo pozas granda E-stelo. La loka filatela klubo aperigis memorigan koverton kaj memorigan karton (350 pecoj). Mi esperas, ke ŝi provizis nian stampobankon per ĝi. Vi ja certe ĉiuj scias, ke tiel vi povas pagi vian jarkotizon por nia klubo.

AF 36
Gratulon al Richard Hirsch, kiu iniciatis novan movadhistorian stampon. La centra Oficejo de GEA ekde 4.2.1988 uzas novan tp por la AF de tiu oficejo. Tiu tekstas (germanlingve): /1888 Nürnberg 1988/Antaú 100 jaroj fondiĝo del unua/Esperantogrupo de la mondo. Tiu afrankstampo funkcias verŝajne dum la tuta jaro.

Bildparto pri la ĉinaj poŝtaj stampoj



1



2



3



4



5



6



7



8



9



10



11



12



13 1



13 2



14



15



16



17



18 1



-2



-3



-4



-5



18 6



19



20



21



22



23



24



25



26



27



28



29



30



31



32-1



32-2



33-1



33-2



33-3



34



35



36



37



38



39



40



41



42



43



44



45



46



47



48



49



50



51



52



53



54



55



56



57



58

1	昆明	10	长沙
2	北京	11	常熟
3	北京	12	常熟
4	北京	13-1	常州
5	常州	13-2	戚墅堰
6	北京	14	成都
7	北京	15	重庆
8	长春	16	福州
9	昌吉	17	广元

18-1	广州	30	马鞍山	43	武汉
18-2	江门	31	南昌	44	无锡
18-3	汕头	32-1	南京	45	梧州
18-4	深圳	32-2	杨州	46	厦门
18-5	新会	33-1	南宁	47	西安
18-6	阳江	33-2	西色	48	西安
19	桂林	33-3	宁明	49	象山
20	贵阳	34	南宁	50	新乡
21	杭州	35	宁德	51	银川
22	哈尔滨	36	青岛	52	镇江
23	合肥	37	上海	53	郑州
24	嘉兴	38	沈阳	54	绵阳
25	济南	39	苏州	55	绵阳
26	汲县	40	太原	56	常熟
27	开封	41	天津	57	常熟
28	昆明	42	乌鲁木齐	58	常熟


80 JAROJ
DE ORGANIZITA
ESPERANTO
MOVADO EN
RIJEKA
1987
E
30. 10. 1987.
51101
RIJEKA


100 GODINA ESPERANTA
VRNJAČKA BANJA
36210
18. 04. 1987.
GODIŠNJA SKUPŠTINA JAFE


36012 ASIAGO (VI)
1·2·1987
2· TROFEO INT.LE SCI FONDO


OLIMPIADA
SZACHOWA
E
ESPERAN-
TYSTÓW
SIEDLCE 1


ESPERANTISTOJ
E
24400 SENTA 06.11.1987.


ESPERANTO NA ZNAK
1887-
1987
E
POLSKA
1987·07·25
WROCŁAW 1 MPiT·H.


LEIPZIG 1
7010
IFER
INTERNATIONALES
ESPERANTO-
MESSETREFFEN
1988
11.3.-10.4.88


HALLE 2
4020
26.02.87-17
Händel-
Domo
LINGVO DE KULTURO KAJ ARTO 1987


33100 UDINE C.P.
19° CONGRESSO TRINAZIONALE ESPERANTO
5·9·1987


APPRENEZ
L'ESPERANTO
1887 1987
CENTENAIRE
de la
LANGUE INTERNATIONALE
ESPERANTO
NTIGNY LES METZ J. D'ARC
10- 8 - 87


0,10
57 MONTIGNY LES


·1887 CENTENAIRE DE L'ESPERANTO 1987·
amikeco trans limoj
7 NOVEMBRE 1987
57 MONTIGNY LES METZ